

LINGVAJ ANGULETOJ

de Jan Werner

publicitaj en INFORMILO, organa revuo de AEH

Pri la verbo danki

K. B. plendas: Ankoraŭ neniu eksplikis al mi, kial en leteroj aperas foje „Mi dankas **al vi**“, alifoje „Mi dankas **vin**“. Simile: „Mi dankas **pro via letero**“ kaj „...**por via letero**“. Se mi skribas „por“, eksterlandanoj tuj reagis, ke estu „pro“, kaj kiam mi skribas „pro“, nialandanoj tuj korektas ĝin al „por“. Kiel do?

Malgraŭ tio, ke K. B. vidas la aferon neklara, la ekspliko estas relative facila (PAG § 177):

1. La verbo „danki“ estas transitiva, ĝi do estas sekvata per objekto(j).
2. Ekzistas du specoj de transitivaj verboj: fiksobjektaj kaj alternobjektaj.
3. La fiksobjektaj verboj estas unudirektaj kaj dudirektaj.
 - a) La unudirektaj verboj efikas nur en unu direkto, ili povas apud si havi nur unu objekton, kiu estas aŭ rekta (ekz. *ami iun*), aŭ nereкта (ekz. *aparteni al iu*).
 - b) La dudirektaj verboj povas apud si havi samtempe du objektojn (ekz. *doni ion al iu*). Kiel vi vidas, el la du objektoj unu staras fikse en akuzativo kaj la alia fikse en prepozitivo. En Esperanto ne estas eble, ke ambaŭ staru en akuzativo (ekz. *doni ion iun* estus grava eraro).
4. La alternobjektaj verboj estas ankaŭ unudirektaj kaj dudirektaj.
 - a) La unudirektaj estas samtempe akompanataj nur per unu objekto, kiu povas esti jen rekta, jen nereкта, sen eĉ nuanca diferenco (ekz. *rememori iun* kaj *rememori pri iu*). Oni povas indiferece transformi la rektan objekton en nerektan kaj inverse.
 - b) Pluraj alternobjektaj verboj estas ankaŭ dudirektaj, ĉe ili ni povas trovi samtempe du objektojn. Ĉe ili ni povas indiferece uzi kiel rektan objekton jen la personon, jen la aferan nomon. Sed la propozicio en la du versioj ne havas la saman prepozicion (ekz. *instrui iun pri io* kaj *instrui ion al iu*).
 - c) Apud alternobjekta verbo ne estas devige starigi ambaŭ objektojn. La neesprimita objekto estas latentita (ekz. *mi skribis al vi*; la latentita objekto estas „letero“).
5. Dedukto: La verbo danki estas dudirekta fiksojektaj verbo, kiun povas sekvi du objektoj: *danki iun por/pro*. Ne eblas diri ekzemple *danki ion por/pro iu* k.s. La rekta objekto „iun“ povas aperi ankaŭ kiel nereкта objekto „al iu“. Jen kelkaj ekzemploj el la Nova PIV: *mi dankas vin por...*; *mi dankis lin por...* (ambaŭ laŭ L. L. Zamenhof); *danki al iu pro io* (K. Bein); *ŝi dankis lin per amebria rigardo*.
6. Ambaŭ prepozicioj por kaj pro estas ĝuste uzataj. La distingo inter celo (por) kaj kaŭzo (pro) de ago ne estas ĉiam klara, tial la prepozicioj por kaj pro povas havi la sencojn preskaŭ identajn. La uzo de „por“ esprimas plivole la entuziasmon pro la akiro de la koncerna objekto de danko, dum la uzo de „pro“ nur eksplikas kialon de la danko. Kiel vi vidis sub la n-ro 5, la uzado de „por“ post danki estas Zamenhofa (ekz. en NPIV ĉe „por 3“, p. 900, estas la citaĵo: *mi dankas vin tre kore por via promeso...*).

2004-05-21

Slavoj, atentu la uzadon de la refleksivo „si“!

La esperanta ŝi estas refleksiva pronomo, kiu en propozicio rilatas al triapersona subjekto (li, ŝi, ĝi, ili). Ĝi ne povas aperi kiel mem subjekto, ĉar neniam ĝi akceptas formon de nominativo, sed sole de akuzativo aŭ prepozitivo. Tion prezentas la tabelo laŭ PAG § 49:

Kazoj	Singularo - Pluralo
Akuzativo	sin
Prepozitivo	je si

Diference de la regulo pri tria persono ĉe la esperanta si, la ĉeĥa refleksivo se (2. sebe; 3. sobě, si; 4. sebe, se; 6. sobě; 7. sebou) reprezentas ankaŭ la unuan kaj la duan personojn:

*umývám se mi lavas min,
oblékáš se vi vestas vin,
vyprávíme si ni rakontas al ni,
píšete o sobě vi skribas pri vi.*

La bezonon de refleksivo estas plej facile montri per ekzemplo:

Paŭlo estas ludanta kun Petro kaj vundis sin (= Paŭlon).

Paŭlo estas ludanta kun Petro kaj vundis lin (= Petron).

Se ne ekzistus refleksivo kaj ambaŭ, Paŭlo kaj Petro, estus reprezentataj per la personpronomo lin, ni ne povus ekkoni, al kiu okazis la vundiĝo.

La traktado de la refleksivo si validas sammaniere ankaŭ por la posesiva (= posedpronomo) formo kun la adjektiva finaĵo -a: sia, resp. sian. Ankaŭ tiuj ĉi formoj rilatas nur al triapersona subjekto:

Mi vizitis mian patron. Li vizitis sian patron. Li vizitis sian amikon kaj lian patron (patron de la amiko). Estas konate, ke mem L. Zamenhof, kiel slave edukita homo, kelkfoje en siaj tekstoj eraris, oni nomas la eventojn „plumeraro“. Ekzemple en la biblia: *Vi, kiu per sia dekstra mano helpas la fidantojn* (en posta eldono korektita al „*kiu per via mano*“).

Se pronomo kun finaĵoj -u, -uj (tiu, kiu, iu, ĉiu...) reprezentas unu aŭ kelkajn personojn el inter ni aŭ vi, oni uzu refleksivon, ĉar la afero rilatas al la u-pronomo, kiu estas triapersona (li, ŝi, ĝi, ili). Se la afero rilatas al la tuta grupo kaŝita sub ni aŭ vi, oni uzu la koncernan personpronomon:

Ĉiu el ni faris sian taskon (ĉiu sian apartan).

Ni ĉiuj faris nian taskon (la tuta kolektivo sen distingo de apartuloj).

Simile: *Multaj el ni ricevis sian taskon* (ne ni ĉiuj, sed multaj el nia kolektivo).

Sed: *Ni ĉiuj ricevis nian taskon* (la tuta kolektivo).

Ankoraŭ unu grava rimarko: La regulo pri „tria persono“ ne aplikiĝas al la vortoj kun la prefiksita sin-. La refleksivo en ili funkcias laŭ la signifo de „mem“: sinddefenda, sindonema, singarda, sinkritiko, sinnmortigo, sinsekvo k.s. En tiaspecaj vortoj perdiĝas la ligiteco al tria persono: *Via sindonemo estas senlima* (laŭ NPIV).

Pri la refleksivo traktas detalege PAG en § 160-163.

Ĉu kunmeti adjektivan radikon kun ĉefelementa substantivo?

Antaŭtempe Rikardo Ŝulco oponis letere al Rüdiger Eichholz: „*Skribi altmontaro estas kaŝa elizio de la adjektiva „-a“. Tiu skribado ne estas ĝeneraligebla. Varmkafo, pintplumo, larĝĉapelo, velkfloro ktp. estas malbonstilaj.*“ Ni rezonu al R. Ŝulco.

La finaĵon „-a“, krom la artikola, ne estas permesite elizii. Se oni tamen eliminis ĝin (ne pro elizio) kaj ligas al substantivo dekstre, oni ricevas kunmetitan vorton, kiu havas substantivon kiel ĉefelementon kaj maldekstre adjektivan radikon kiel flankelementon. Ekzemplo el la supra citaĵo: alt/montar/o. La kunmetaĵo estas formita nepre ĝuste, ĝi estas eĉ bonstila. En la ĉeĥa lingvo ni havas por ĝi ekvivalenton „velehory“. La baza eraro de R. Ŝulco estas lia kredo, ke en la kunmetaĵo la radiko alt' (same varm', larĝ') estas adjektivo. Ne! En la kunmetaĵo alt' estas eliziita substantivo alto. Jen ekspliko:

Laŭ esploroj faritaj de René de Saussure (1908-1914), universitata profesoro en Ĝenevo, en Esperanto validas la teorio pri vortfarado, vortkonstruo kaj reguloj pri vortefiko. La teorion L. L. Zamenhof letere aprobis jam en la jaro 1910 kaj esprimis konvinkon, ke la Akademio akceptos ĝin. Pro longedaŭraj diskutoj ĝi estis de la Akademio oficialigita nur en la jaro 1967. Unu el la reguloj preskribas:

Substantiva ĉefelemanto substantivigas la antaŭan flankelementon.

En nia ekzemplo *altmontaro* la radiko *alt'* prezentas do la substantivon *alto*, ne la adjektivon *alta*. Tio signifas, ke „altmontaro“ ne estas identa kun „alta montaro“. Simile „varmkafo“ ne estas „varma kafo“ ktp. Kiel do kompreni la kunmetaĵojn?

La sendube serioza verko *Plena analiza gramatiko de Esperanto* (PAG) en § 291 instruas nin pri analizeblo de la kunmetaĵoj kun substantiva ĉefelemanto:

La flankelemanto esprimas 1. rilaton aŭ apartenon, kiun oni povas signi per la prepozitivo *de*. Ekzemplo: *varmenenergia* = *energia de varmo* (ne varma energio!) = analizo R[ilato]. Sekvas specoj pri analizeblo, kiuj ne rilatas al adjektivaj radikoj.

Ĝenerale, por koni la precizan signifon de vorto, oni devas difini la manieron de analizo, t.e. *interelementan rilaton*. En kunmetaĵoj de substantiva radiko + substantivo estas kazoj, kiam ilin fiksas konvencio. Ekzemple en *orĉeno* estas la interelementa rilato esprimebla ne nur per prepozitivo *ĉeno el oro*, sed ankaŭ per la a-finaĵo gluita al la flankelemanto: *ora ĉeno* (= analizo M[aterialo]). En la kazo de adjektivaj radikoj tia M-analizo ne estas ebla: *belkulto* ne estas *bela kulto*, sed *kulto de belo* (kulto, kiu montriĝas per belaj ceremonioj). PAG plu admonas: La kunmetoj *Bluokulo*, *belknabino*, *bonpatrino* k.s., kiuj deziras montri kvaliton kiel prorecon de iu aŭ io, estas kontraŭaj al la reguloj de la vortkunmeto.

Mediala voĉo ne toleras pasivajn finaĵojn

„*Damaĝinsekto estis alveturigita...*“ – Ĉu bone?

Ni konsciu la faktojn por la prikonsidero:

§ La verbo „alveturi“ estas netransitiva.

§ La sufiksoido –iĝ esprimas medialan voĉon.

La mediala voĉo, aŭ simple medialo, estas unu el kvar verbaj voĉoj (aktiva, pasiva, faktitiva, mediala). En la ĉeĥa lingvo la aktiva voĉo kaj pasiva voĉo estas nomataj „*činný rod a trpný rod*“. La aktiva voĉo esprimas agon aŭ staton (ekz. *mi konstruas*); ĝi estas la baza voĉo. La pasiva voĉo esprimas agon suferatan (*io estas konstruata*). La faktitiva voĉo prezentas trudon de ago de subjekto al iu alia, kiu plenumas ĝin (*mi konstruigas domon pere de konstru-entrepreno*). La faktiviva voĉo estas esprimata pere de la sufiksoido –ig. Se ago reagis al la subjekto mem, tio estas la mediala voĉo (*Tagiĝas . La domo konstruiĝas*. – La domo estas subjekto, kiu kvazaŭ mem konstruas sin). La medialan voĉon karakterizas la sufiksoido –iĝ.

Laŭ origina senco la sufiksoido –iĝ esprimas komencan aspekton (ekesti ia, iĝi ia, veni en novan staton). Verbo, kiu havas antaŭ sia finaĵo la sufiksoidon –iĝ, estas kiel tuto ĉiam netransitiva. Tamen ekzistas diferenco inter verbradikoj transitivaj kaj netransitivaj, ili funkcias malsame. Ni sekvu la ekzemplojn:

- a) Netransitiva „sidi“: *Panjo sidiĝis* = Panjo iĝis sidanta, resp. Panjo komencis esti sidanta. Ĉi tie ne ekzistas pasiviga efiko de –iĝ, ne eblas kompreni „Panjo iĝis sidata“, ĉar netransitivaj verboj ne prezentas agon de iu suferatan, sed nur plenumatan, „esti –anta“. Male, ĉe transitivaj verboj oni komprenu „esti –ata“ (pasiviga efiko de –iĝ).

- b) Transitiva „ruli“: *Ŝtono ruliĝis*. Provu imagi la komencan aspekton (Ŝtono iĝis, komencis esti, rulata?) La komencon de la ago „rul“ ni ne trovas, objektive ni komprenas proksimume nur „Ŝtono estis rulata“; la aspekto estas daŭra, ne komenca. Se ni deziras esprimi la komencan aspekton, ni devas aldoni „ek“: *Ŝtono ekruliĝis*. Tamen ekzistas esceptoj kaŝe enhavantaj „ek“: *sciigi pri* (ekscii), *komuniki kun* (ekkomuniki), *decidiĝi* (ekdecidi).

En la enkonduka dubinda frazo ne povas esti la finaĵo –iĝita, sed –iĝinta (alveturiĝinta). Kalocsay kaj Waringhien (PAG, § 104) pri la afero skribis: „Ĉar la mediala voĉo havas en si pasivecan karakteron, estus pleonasme kaj eĉ absurde uzi ĉi tie la pasivajn finaĵojn: do formojn kiel *kaptiĝata*, *naskiĝita* ktp. estas simplaj barbarismoj.“

En la enkonduka frazo stile pli konvenas la faktitiva voĉo „*estis alveturigita*“. La mediala voĉo estas krome uzebla ankaŭ en la simpla (nekompleksa) tempo: „*Damaĝinsekto alveturigiĝis*“.

2004-08-18

Serio – serialo

En Starto n-ro 3/2004, paĝo 91, mi legis: **televidaj filmserioj**. La aŭtoro pravus, ĉar en la ĉeĥa-esperanta vortaro de Karel Kraft ni povas legi: **seriál** *m* (film)serio. Tamen mi rekomendas por la ĉeĥa „seriál“ uzadi la formon serialo, en kiu aperas la internacia sufikso -al.

Pri la sufikso -al Karolo Píĉ skribis en „La Litomiŝla tombejo“ (1989): -al’ estas PIV-sufikso, esprimanta, ke temas pri io aparte, speciale, karakterize -a, io -a en ia pli altkategoria senco (*muziko – muzikaĵo – muzikalo*); -al’ estas kvazaŭ ia nepersona paralelo de -ul’ (*trimastalo – trimasta ŝipo*). Plue Píĉ donas 77 ekzemplojn de konvena uzo (*arealo, benalo, finalo, ĥoralo, Ilustralo [PIV], marialo, monatalo, semajnalalo, tagalo, serialo...*). Do, ankaŭ por „seriál“ li lanĉis la al-formon.

Mi aldonas, ke la al-sufikso en Esperanto latente (kaŝe) ekzistas dekomence. Konataj ja estas vortoparoj (sen troa pripensado, hazarde elektitaj): ideo – idealo, materio – materialo, radikulo – radikalo, moro – moralo, vitro – vitralo, origino – originalo, integro – integralo, pluro – pluralo, bato – batalo, vegeto – vegetalo, horizonto – horizontalo, fato – fatalo, katedro – katedralo kaj dekoj da aliaj, ofte uzataj en adjektiva formo (ideala, morala, horizontala).

La sufikso -al estas latindevena kaj en la latina lingvo ĝi ligiĝas al substantivo, kiun ĝi adjektivigas (*embrional, vital, lateral, lokal, dorsal, continental, oval...*) En la latina ĝi havas ampleksan utiligon. En la planlingvo Esperanto ĝi havu limigitan taskon, ĉar en Esperanto ni adjektivigas substantivojn rekte (*embrio – embria, vivo – viva, latero – latera* ktp.). La rekomendo antaŭtempe farita de K. Píĉ estas akceptebla: nomumi konkretaĵojn rilatajn al io, ekz. *tagalo* = tag-al/a o (taga gazeto, ĉeĥe „deník“). Logika kaj ankaŭ utila estas malnova propono de E. Wüster, pere de -al adjektivigi substantivojn kun adjektivkarakterata radikulo: *varma* (teplý) → *varmo* (teplo) → *varm/o/a* → *varmala* (teplný).

2004-12-07

Atentu la prepoziciojn de kaj da

Mi legis: *Tri mil da kronoj. – Modesta nombro da esperantistoj. – Ĉu ĝuste?*

La prepozicion „da“ ni uzu, kiam ni havas difinitan, ne nepre precizan, kvanton, nombron, pezon, mezuron, gradon en rilato al substantivo nedifinita. Ekzemple: *poto da lakto; peco da*

tolo; bukedo da *floroj*. La esprimoj indikas, pri kiom da lakto, tolo, floroj oni parolas. **La prepozicio da determinas la kvanton.** – Sed povas okazi situacio, kiam oni ne demandas „kiom“, sed kio formas enhavon de la poto, pri peco de kio oni parolas, kiuj floroj formas la bukendon. En tiu kazo oni respondas: *poto de lakto*; *peco de tolo*; ekzemple *bukedo de rozoj*. **La prepozicio de specigas la suplementon.** La dua enkonduka frazo estu: *Modesta nombro de esperantistoj*.

La prepozicio „da“ estas uzenda post substantivigitaj entjeraj numeraloj (ne post frakcioj). Ekzemploj: *miroj da kronoj*; *deko da koboldoj*. En la supra enkonduka frazo, kie estas la baza numeralo (mil), ne povas esti da, nek de, ĝi devas esti sen prepozicio: *Tri mil kronoj*.

Memoru la nuancon: *dek butonoj = deset knoflíků*. *deko da butonoj = asi deset knoflíků*.

2005-01-30

Kiel diferencas prezenti kaj reprezenti?

Mi legis: *La portreto reprezentas virinon de la familio Fürstenberg*. – Ĉu bone?

La nova Plena Ilustrita Vortaro (PIV) traktas la verbojn prezenti kaj reprezenti kiel aŭtonomajn radikvortojn pro malproksimeco de ties signifoj. Ambaŭ verboj originas en la latina lingvo: praesentare kaj repraesentare. Evidente temas pri unu sama radikoj kaj la prefikso re, do ankaŭ la esperantan duopon ni povas laŭetimologie trakti tiel.

praesento, -are: transdoni, liveri,

repraesento, -are: 1. denove prezenti, antaŭ oni aktualigi; imiti (virecon, latine virtutem); 2. senprokraste fari, plenumi; 3. (*en la mezepoka kaj novtempa latino*) reprezenti.

Esperantaj signifoj laŭ la nova PIV:

prezenti: 1. Meti ion antaŭ iu. Ekz.: *Prezenti tason al invitito*. 2. Konduki iun antaŭ aliaj personoj kaj konigi tiun al ili. Ekz.: *La princo prezentis sian fianĉinon al la kortego*. 3. Starigi antaŭ ies imago la bildon de iu aŭ io. Ekz.: *Prezentu al vi mian embarason*. 4. Meti antaŭ ies okuloj ion faritan per parolo, pentrado aŭ alia arto. Ekz.: *La bildo prezentas virinon*. 5. Ludi antaŭ publiko teatraĵon aŭ filmon. Ekz.: *Mi prezentas dramon*. 6. (io) Sin montri al ies menso sub unu el siaj aspektoj. Ekz.: *La afero prezentas malfacilaĵon*. 7. (io) Montri la karakterizajn trajtojn de io. Ekz.: *Vesto homon prezentas*.

reprezenti: 1. Laŭkomisie anstataŭi iun en la plenumado de ties taskoj kaj rajtoj. Ekz.: *Ambasadoro reprezentas sian regnon*. 2. Vojaĝi kaj komerci en la nomo de iu firmo. Ekz.: *Li reprezentas firmon Hachette*.

Konkludo: La verbo reprezenti en la legita frazo estas uzita malĝuste, ĉar la celata signifo identas kun la verbo prezenti n-ro 4 (vidu supre). La sole ĝusta versio: *La portreto prezentas virinon de la familio Fürstenberg*.

2004-10-21

Amaskomunikiloj, mediato

Oni demandas, kiel traduki la ĉeĥajn vortojn „médiá“, resp. „masmédiá“. Ilian signifon ni imagas kiel rimedojn de amasa komunikado (masové sdělovací prostředky). Al anonima homamaso de akceptantoj ili portas mesaĝojn pere de granda nombro de identaj kopioj (en la formo de presitaj ekzempleroj, signalo, magnetaj kopioj, filmkopioj, flugfolioj, afiŝoj k.s.). Rimedoj de amasa komunikado estas verdire monologaj, nur en unu direkto ili rapide disvastigas informojn, disvastigas amaskulturon. Ili helpas eliminadi diferencojn inter urboj

kaj vilaĝoj, inter klera „elito“ kaj amaso. Aliflanke ili estas konsiderataj rimedo de ĝenerala manipulado, kaŭzo de malseriozigo kaj vulgarigo de homaj pensoj kaj sensoj, la ĉefa vastiganto de konsuma pensmaniero. Ili signife partoprenas la evoluon de t.n. amasa socio.

En Esperanto ne eblas la nocion nomi „masmedioj“ aŭ „amasmedioj“, ĉar la vorto medioj ne estas ekvivalento de la supre priskribita ĉeĥa „médiá“. Ĉar temas pri iloj de komunikado, ni povas „masmédiá“ nomi **amaskomunikiloj**. Nova Ilustrita Vortaro krome enhavas singularan nocion **mediato**, kiun ĝi eksplikas kiel „unu el la amaskomunikiloj“.

2004-06-06

Kompleksaj tempoj en Esperanto estas iluzio

V Zamenhofovĉ nedotknuteblnĉm zĉkladu esperanta je 16 pravidel a o slovese a ĉasovĉnĉ pojednĉvĉ 6. pravidlo, kterĉ zde doslovnĉ ocituji:

La *verbo* ne estas ŝanĝata laŭ personoj nek nombroj. Formoj de la verbo: la tempo estanta akceptas la finiĝon *-as*; la tempo estinta *-is*; la tempo estonta *-os*; la modo kondiĉa *-us*; la modo ordona *-u*; la modo sendifina *-i*. Participoj (kun senco adjektiva kaj adverba): aktiva estanta *-ant*; aktiva estinta *-int*; aktiva estonta *-ont*; pasiva estanta *-at*; pasiva estinta *-it*; pasiva estonta *-ot*. Ĉiuj formoj de la pasivo estas formataj per helpo de responda formo de la verbo *esti* kaj participo pasiva de la bezonata verbo; la prepozicio ĉe la pasivo estas *de*.

O složených ĉasech, v uĉebnicích esperanta nazývaných jako *kompleksaj* nebo *malsimlaj*, se Zamenhof nikdy nezmĉnil. Tyto ĉasy vymyslili snaživĉi stoupenci hnutí zĉhy po zveřejnĉnĉ esperanta: Ludwig Emil Meier již v roce 1891, později Pierre Delaire, Camille Aymonier, Paul Fruictier a jinĉ. Implantovali do esperanta francouzskou konjugaci, aniž vzali na vĉdomĉ, že mezinĉrodní jazyk se nemůže řĉdit jen francouzským modelem. Je s podivem, že teorii složených ĉasů převzali i autoři „Plena analiza gramatiko de Esperanto“ (PAG, viz § 100, 101). Složené ĉasy jsme se uĉili a uĉíme také my podle našich uĉebnic (např. T. Kilian, V. Barandovská a j.).

V mnoha evropských jazycích existují složené ĉasy s pomocnými slovesy, např. být, mít, chtĉt, stĉvat se, muset, jĉt, aĉkoliv sĉm tvar složenĉho ĉasu význam tĉchto sloves neobsahuje, je integrovĉn do významu zvlĉštnĉích složených konjugací. Naproti tomu esperantské tzv. složené ĉasy řĉdnĉ významovĉ propojĉnĉ pomocného slovesa *esti* s významovĉm slovesem neobsahují. Na tuto skuteĉnost upozornil již A. D. Atanasov v publikaci „La Lingva Esenco de Esperanto“, novĉ A. Cherpillod v knize „Lingvaj Babilajoj“ (2005).

To, co se v esperantu nazývá složeným ĉasem, nepředstavuje slovesný tvar. Je to obyĉejný vztah podmĉtu k přísudkovĉmu adjektivu pomocí sponovĉho slovesa *esti*. Toto spojení slovesa *esti* a přechodníku v tvaru ĉinnĉm nebo pasivním (jsou to adjektiva) je totĉž jako spojení slovesa *esti* a libovolného adjektiva. Příklady:

Esti invitita nebo *esti vojaĝonta* nejsou složenými tvary o nic více než *esti feliĉa*.

Tuto skuteĉnost si můžeme ovĉřit i na trojici vĉt, kterĉ představuje „sousednost ĉasů“, kterĉ bývá důvodem pro obhajování (dle mého názoru) iluzornĉích složených ĉasů. Příklad je převzat z výše uvedenĉ knihy A. Cherpilloda:

1. La lastan dimanĉon mi restis hejme, ĉar mia aŭto paneis, ĝi **estis riparota**.
2. Mardon mi devis vojaĝi autobuse, ĉar mia aŭto **estis riparata**.
3. Ĵaŭdon mi vojaĝis aŭte, ĉar mia aŭto **estis riparita**.

Z obsahu vĉt můžeme usuzovat, že v pondĉlĉ jsem předal auto do opravy a ve středu jsem ho převzal opravenĉ. Adjektivní tvary významovĉho slovesa *ripari* (*riparota*, *riparata*, *riparita*) můžeme nahradit obyĉejnými adjektivy a syntaktický mechanismus se nezmĉní: Dimanĉe mia aŭto **estis blanka**, marde (refarbita) ĝi **estis flava** kaj ĵaŭde (denove refarbita) ĝi

estis blua. Namísto neexistujícím složeným časům je třeba věnovat čas studia významu přechodníků.

Tvrzení, že v esperantu jsou složené časy podobné těm v národních jazycích, se vymyká logice esperanta, je to bláhové komplikování jeho jednoduché mluvnice.

Resumo en Esperanto: La aŭtoro de Esperanto ne provizis la lingvon per kompleksaj verboformoj (tempoj). Naive elpensis ilin liaj posteuloj. La teorion kaj instruon pri kompleksaj tempoj kritikis A. D. Atanasov kaj A. Cherpillod. La komplekso „esti + participa adjektivo“ ne havas apartan sencon, temas ja nur pri rilatigo de subjekto al predikata adjektivo. Ekzemple «esti invitita» ne estas pli kompleksa al «esti feliĉa».

2007-04-12

Erara uzo de la adverbo „ĵus“

En aliĝilo por scienca konferenco de ISAE mi legas: „Konferenco... **ĵus** antaŭ la 91-a UK en Florenco.“ – Kial seriozaj scienculoj tiel fuŝas la lingvon? Ĝenerale oni opinias ĝin ekstreme facila kaj forgesas, ke ankaŭ Esperanton oni devas studi.

Príslovce **ĵus** se užívá pro časové určení události, která se stala a také skončila „chvíli před okamžikem konstatování“ (*momenton antaŭ nun*), a to nejen okamžikem současným, ale také v minulosti (*momenton antaŭ tiam*), tolik podle PIV/NPIV. Tuto informaci upřesňuji upozorněním, že **ĵus** nelze užít, když ona událost, o níž mluvíme, se uskutečnila nyní, v této chvíli. V takovém případě musíme užít příslovce **ĝuste**.

Príslovce **ĝuste** (kořen *ĝust* je adjektivního charakteru) je způsobové ve významu „správně, správným způsobem“ (*ĝuste funkcii*; *ĝuste kakuli*) nebo „zcela přesně, bez jakékoli pochybnosti“ (*ĝuste antaŭ du monatoj*; *ĝuste nun*). Tento druhý případ časového určení odpovídá větě o konferenci ISAE v úvodu: „*ĝuste antaŭ la 91-a UK en Florenco.*“

Resumo en Esperanto – la ekspliko de **ĵus** laŭ NPIV: „Cirkonstanca morfemo, signifanta «momenton antaŭ nun» aŭ «antaŭ tiam»: *ĵus batis la sesa horo^Z*; *ĵus finiĝis dudek jaroj de la tempo, kiam aperis publike la lingvo^Z*; *mi ĵus parolis kun la mastrino^Z*; *ĝuste pri tio mi ja ĵus parolis^Z*; *ŝi meditas pri la ĵus aŭditaj vortoj^Z*; *la ĵusnaskito^Z*.“ – Rim.: Vi vidas, ke ĉiuj ekzemploj estas ĉerpitaj el la verkaro de Zamenhof.

2006-03-28

Misuzo de la pronomoj „kia“ kaj „kiu“

„**Kia**“ je tázací zájmeno, má adjektivní koncovku –a, to znamená, že se vztahuje ke kvalitě. Jeho posláním je vyjadřovat otázku po vlastnosti, kvalitě: **Kia** estas lia karaktero? **Kia** estas vetero? En **kiaj** cirkonstancoj li tie vivas?

Zájmeno „**kiu**“ vyjadřuje především otázku po výběru, vyčlenění jednotlivé osoby, věci nebo ideje z daného souboru: **Kiun** aŭtoron vi ŝatas? **Kiun** libron el mia biblioteko vi prunteprenos? En **kiu** monato vi libertempos?

Poměrně často se setkáváme se záměnou těchto dvou zájmen, snad také proto, že i v hovorové češtině dochází ke stejné chybné záměně zájmen **jaký** a **který**. Rozlišování těchto zájmen ve spisovném jazyce je nutné jak v češtině tak v esperantu.

Argument, že ve správném užívání nebyl důsledný ani autor esperanta, není přijatelný. Ve slovníku PIV z roku 1970 jsou citovány Zamenhofovy tázací věty: „*Kia estas lia nomo?*“

Pravděpodobně se ptal na jméno osoby (*Kiu li estas?*), nikoliv na jeho vlastnost, např. je-li jeho jméno pěkné, německé apod. Jiná Zamenhofova otázka: “*Kia supo ĝi estas?*” Ptal se na druh polévky (*kiu? Legoma, piza, vianda* apod.), ne na její chuť. V tomto druhém případě by se zeptal otázkou s jiným slovosledem: “*Kia estas la supo?*” *Bongusta*.

Resumo en Esperanto: Ni nepre distingu la pronomojn „*kia*” kaj „*kiu*”. Per „*kia*” oni esprimas demandon je propreco, kvalito (*Kia estas la vetero? Suna.*). Per „*kiu*” oni esprimas demandon je elekto, elpreno de unuopa persono, aĵo aŭ ideo el donita aro da specoj: (*Kiun aŭtoron vi ŝatas? Karel Čapek.*)

2007-03-23

Adverboj „foje” kaj „iam” diferencas

„*Foje*” a „*iam*” jsou příslovce času a ve významu se trochu liší. „*Foje*” (jednou, jedenkrát, kdysi) znamená jen jednu událost (děj) v neurčitěm čase, která může být okamžitá nebo trvalá, zatímco „*iam*” (někdy, kdysi) může být použito také pro opakování děje, a to v čase zcela nedefinovaném nebo v blíže neurčeném čase minulém nebo budoucím. Příklady: *foje vivis reĝo...; iam mi ofte vizitis lin.*

Príslovce „foje” je odvozeno koncovkou „-e” od substantivního kořene „foj”, který je obtížně přeložitelný do češtiny, není ani ve slovnících (Filip, Malovec). *Fojo* můžeme vyjádřit větou „to, co se jednou stalo (stává, stane)” anebo substantivizovanými příslovci (to) jednou, (to) jedenkrát, nebo jen (to) krát. Ekzistuje však substantivum „ráz”, jehož jeden význam je „jeden úkon”, jak to vyplývá z výrazů: jednorázový, jedním rázem; ráz se rovná německému *das Mal*. V NPIV je *fojo* vysvětleno jako „*ĉiu el la okazoj, kiam io okazas*”. Zůstaňme však u tvarů příslovce a příslovečných určení času:

- § alifoje; venontfoje, venontan fojon – jindy; příště; Alifoje mi venos kun mia edzino.
- § ĉi-foje – tentokrát; Ĉi-foje mi certe aliĝos.
- § ĉiufoje, ĉiun fojon – pokaždé, vždy; Mi partoprenis la aranĝon ĉiufoje (ĉiun fojon).
- § foje-foje – čas od času, zřídka; Foje-foje revenas la malnovaj revoj.
- § iufoje (iun fojon el certaj fojoj) – jednou, někdy (sporadicky); Li multfoje falis de sur ĉevalo, iufoje li eĉ rompis al si la kruron.
- § je kioma fojo – po kolikáté; Je kioma fojo vi estas en la seminario?
- § je la unua fojo, je la dua fojo – (na)poprvé, (na)podruhé; La koko kriis je la tria fojo.
- § kelk(a)foje, plurfoje, multfoje – několikrát, vícekrát, mnohokrát; Mi legis la libron plurfoje.
- § kiom da fojoj – kolikrát; Kiom da fojoj okazis la seminario?
- § kioman fojon – po kolikáté; Kioman fojon ĝi okazas nunjare?
- § kiomfoje – kolikrát; Kiomfoje vi partoprenis la seminarion en Skokov?
- § lastfoje – minule; Lastfoje mi venis malfrue.
- § lastan fojon, por la lasta fojo – naposledy; Mi venos por la lasta fojo.
- § per unu fojo – jedním rázem, napoprvé; jednou pro vždy; Li solvis la taskon per unu fojo.
- § refoje – znovu, opakovaně; Refoje mi avertas vin, ke vi ne fumu.
- § unu fojon (unufoje) por ĉiam – jednou pro vždy; Mi ĉeestis unu fojon por ĉiam.
- § unuafoja, duafoja atd. – první, druhý (z hlediska času); Mia unuafoja vizito de via hejmo...
- § unuafoje, duafoje atd. – poprvé, podruhé; Unuafoje mi vizitis vian hejmon.
- § unufoja, dufoja atd. – jednorázový, konající se jednou, dvakrát; Unufoja vizito de leciono sufiĉas.
- § unufoje, dufoje atd. – jednou, jedenkrát, dvakrát; Dufoje mi partoprenis la aranĝon (en la aranĝo).

2007-02-28

Erara uzo de la prepozicio PO

V časopise *Esperanto* 11/2005 (UEA) jsem četl „*oni sendu po unu ekzempleron*“, v brožuře H. Suonuuti *Terminologia gvidilo* „*priskribu nur po unu nocion*“ a ve *Startu* 4/2005 „*nombro de la tralegitaj libroj estis 150 po jare*“.

Nový PIV definuje předložku takto: „*Prepozicio signifanta: «en egalaj partoj, konsistantaj el», kaj uzata por montri, ke la kvanto aŭ mezuro esprimata de la numeralo aŭ vorto esprimanta kvanton, ne rilatas unufoje al ĉiuj objektoj aŭ personoj kune rigardataj, sed ja rilatas ripete kaj sinsekve al ĉiu el ili aparte.*“

Při prvním čtení vám bude tato definice asi nesrozumitelná. K pochopení a procvičení si proto vezmeme větu použitou jako příklad přímo Zamenhofem: **Por miaj kvar infanoj mi aĉetis dek du pomojn, kaj al ĉiu el la kvar infanoj mi donis po tri pomoj.**

V této větě «*egalaj partoj konsistantaj el*» jsou *TRI POMOJ*. Tato tři jablka se nevztahují ke všem čtyřem dětem společně (*ne rilatas unufoje al ĉiuj personoj*), ale spolu s předložkou (*PO TRI POMOJ*) se vztahují opakovaně a postupně (*riplete kaj sinsekve*) ke každému dítěti zvlášť. Autoři první a druhé výše uvedené věty závažně chybovali v domnění, že předložka *PO* se vztahuje pouze k číslovce (*PO UNU*), namísto k celému údaji o množství (*PO UNU EKZEMPLERO*; *PO UNU NOCIO*). Definice v NPIV praví, že předložka *PO* „*rilatas ripete kaj sinsekve al ĉiu el ili (OBJEKTOJ aŭ PERSONOJ) aparte,*“ tedy na věci a osoby, nikoliv na číslovku. Dále víme, že po předložkách v esperantu následuje nominativ, nikoliv akuzativ. Správné znění tedy je: „*oni sendu po unu ekzemplero*“, „*priskribu nur po unu nocio*“.

Třetí příklad z úvodu, „*150 po jare*“, je také hrubou chybou, protože předložka *PO* se klade zásadně před rozdělované množství, ne před jednotky, na které se ono množství rozděluje. V našem případě je rozdělované množství *TRALEGITAJ LIBROJ* a jednotka, na kterou se toto množství rozděluje, je *JARO*. Správné znění věty je tedy: „*nombro de tralegitaj libroj estis 150 en jaro*“, nebo „*...150 jare*“. Vhodnější znění věty, s použitím předložky *PO*, by bylo: *Oni tralegis po 150 libroj en jaro (jare)*.

Noto en Esperanto: La prepozicio *PO* estas slavdevena ne nur laŭ la formo, sed ankaŭ laŭ sintaksaj rilatoj. Bedaŭrinde, la prepozicio ne havas ekvivalenton en okcidenteŭropaj lingvoj, tial por la parolantoj de tiuj lingvoj estas malfacile koncepti ĝian signifon kaj uzmanieron.

Mia detala ekspliko de ĉi tiu prepozicio, akompanata de la analizo verkita de D-ro Tomáš Pumpr, estis publicita en la revuo *Esperanto* (UEA) n-ro 10 kaj 11 en la jaro 2002 sub la titolo „Por kiu estas la prepozicio *PO* diabla?“ La tekston vi povas ankaŭ elpeti ĉe la retadreso: verne@tiscali.cz.

2006-03-21

Distingu la prepoziciojn pro kaj por

Předložka **pro** značí příčinu a motiv konání, nikoliv účel konání. Českými ekvivalenty jsou: kvůli, pro, za, z důvodu. Předložka **pro** je zjednodušeným vyjádřením složených předložek (v PAG, § 122, jsou nazvány „prepoziciaj“) **sekve de**, **kaŭze de**, kterým odpovídá české „z důvodu“. Uvedu několik příkladů ze Zamenhofova díla: *veni pro serioza*

afero; li amas sin pro sia beleco; pro kio ŝi ploras?; okulon pro okulo, denton pro dento (oko za oko, zub za zub).

Předložka „pro“ se občas nesprávně zaměňuje za předložku **por**, která vyjadřuje účel, tedy cíl konání, nikoliv příčinu konání. Jednoznačné použití předložky **por** je zřejmé v aplikacích: *fari ion por ies honoro; labori por komuna utilo*. Po předložce **por** může následovat sloveso také v neurčitém tvaru – infinitivu, je-li činitel (podmět) totožný pro obě činnosti: *li estis invitita por kanti; mi venis por diri al vi...*

Jsou však případy, kdy je obtížné rozlišit, zda se jedná o příčinu (pro) nebo účel (por) nějakého konání. Například Zamenhof užil vazbu: *fosi pro akvo*, protože kopání bylo motivováno získáním vody. Bylo by však také správné: *fosi por akvo*, protože voda je účelem – cílem – kopání. Podobně PAG uvádí: *morti por la patrujo*, kdy blaho vlasti je cílem oběti. Správné je však také: *morti pro la patrujo* – zemřít kvůli vlasti, pro vlast, za vlast.

Resumo en Esperanto: La prepozicio **pro** montras kaŭzon, motivon de iu ago, dum la prepozicio **por** montras celon de iu ago. Sed estas situacioj, kiam estas uzeblaj egale **pro** kaj **por**, la elekto dependas de subjekto, kiu parolas aŭ verkas, ĉu li aŭ ŝi en la koncerna ago subjektive sentas pli kaŭzon aŭ pli celon de la ag(ad)o. Ekzemplo: *kanti pro ĝojo* (eble la propra); *kanti por ĝojo* (eble de aŭskultantoj).

2006-03-18

Ĉu „nebulo vaporiĝas“?

Pan Kurisu Kei, Japonec, znalý esperanta a také češtiny, se nedávno setkal v překladu z češtiny se slovy „nebulo vaporiĝas“ a s poznámkou, že se jedná o germanismus. Zda je to pravda, se zeptal M. Malovce a ten potom mne.

Podle mých znalostí se v češtině neříká „mlha se vypařuje (či odpařuje)“ a také Němci neříkají „der Nebel verdampft“. Nejedná se tedy o germanismus ani čechismus, ale o něčí nezvyklý překlad do esperanta.

Aby byl překladatel věrohodný, měl by vždy znát podstatu věci, neměl by překládat doslovně (otrocky), ale odborně přesně, neměl by být poplatný žádnému národnímu idiomu. Co se tedy děje s mlhou, když postupně řidne a nakonec zmizí (rozpustí se, rozplyne se v okolním vzduchu).

Mlha představuje aerosol (NPIV ji nesprávně nazývá párou), tzn. směs atmosférického vzduchu a malých vodních kapiček. Je-li vzduch vodní parou (tj. vodou) nenasycen, relativní vlhkost vzduchu je menší než 100 % a na mlhu působí teplo, např. teplo slunečního záření shora, mlha postupně mizí, česky říkáme, že se rozpouští. Ve skutečnosti se kapičky vody skutečně odpařují, přecházejí tedy do skupenství plynného a tím do atmosférického vzduchu. Jeho nasycení (%) stoupá. Ze školní fyziky nám je známo, že čím vyšší je teplota vzduchu, tím více vodní páry pojme. Snad vás zaujme, že při teplotě -20 °C vzduch pojme jen 0,90 g/m³, při 0 °C již 4,84 g/m³ a při našich obvyklých +20 °C dokonce 17,30 g/m³.

Závěr: „**Nebulo vaporiĝas**“ je **teoreticky správné**, ale zřejmě, a to nejen pro Čechy, nezvyklé. Doporučuji proto obecnější hovorové pojmenování tohoto přírodního fyzikálního jevu: **nebulo solviĝas**, **aersorbiĝas**, **aerdisiĝas**. Která z těchto variant má šanci získat prvenství, nedovedu posoudit. O tom by mělo rozhodnout praktické užívání v mezinárodním společenství esperantistů.

Když věnujeme pozornost mlze, bude rozumné si říci, jak vyjádřit další související úkazy:

- § Dělá se mlha – Nebuliĝas; formiĝas nebulo – Es wird nebelig.
- § Mlha padá – Nebulo falas (sinkas) – Der Nebel fällt (senkt sich).
- § Mlha houstne – Nebulo densiĝas – Der Nebel verdichtet sich.
- § Mlha řidne – Nebulo maldensiĝas – Der Nebel lichtet sich.

- § Mlha se trhá – Nebulo (dis)ŝiriĝas – Der Nebel zerreiŝt.
 § Mlha stoupá – Nebulo leviĝas – Der Nebel steigt.
 § Mlha se valí – Nebulo ruliĝas – Der Nebel wallt.
 § Mlha leží nad jezerem – Nebulo kuŝas super lago – Der Nebel lagert über dem See.
 2006-01-02

Pri la verbo „interesi“

Venis al mi demando: *Mnozí esperantisté užívají slovo „interesato“ (i v časopisech) v pasivním tvaru pro český výraz „zájemce“. Zájemce je však ten, kdo se o něco zajímá. Jestliže se já zajímám o někoho, pak on je předmětem zájmu a je vůči mně v pasivní roli. „Interesatoj, aliĝu ĝis ...“ – snad si mohu dovolit takto vyzvat ty, které jsem předtím oslovil. Jak však pojmenovat ty, kteří se hlásí úplně sami?*

Sloveso „interesi“ je přechodné (tranzitivní), jeho význam je v NPIV vyjádřen takto: *Tenadi ies atenton, vekante scivolon.* Zájem je tedy vzbuzován v člověku někým nebo něčím, ten člověk je tedy zájmem dotčen, „trpí“ zájmem, proto tvar „interesato“ je správný. Pokud ono vzbuzení zájmu není ničím vyvoláno, ale sám člověk z vlastního popudu „se zajímá“ o něco, potom v esperantu použijeme mediální tvar „*interesiĝi*“, tedy s příponou *-iĝ* mediálního rodu, který je regresivní (děj zasahuje subjekt). V esperantu se tento rod (*voĉo*) nazývá *mediala voĉo* nebo *medialo* a ona osoba je „*interesiĝanto*“.

Resumo en Esperanto: *Interesato estas homo, kies intereso estis de iu aŭ io elvokita (interesita). Male, se impulso por intereso venis de la subjekto mem, poste tiu homo estas interesiĝanto. Tiu ĉi nomindiko estas derivaĵo formita helpe de la sufikso por la mediala voĉo -iĝ.*

2006-03-31

Propagi – aŭskulti – absolvi – ĝoji

La redaktoro de „Informilo“, Míša Filip, konfesis, ke pluraj legantoj „doktajn“ lingvajn anguletojn preterlasas, ne legas, ke por progresanta lernanto de Esperanto pli utilas mallongaj simplaj admonoj pri eraroj. Li atentigis pri kvar ofte nekonvene uzataj verboj, mi prikomentas ilin:

1. **Propagi** (*ŝirit*; fizika kaj medicina nocio) ne estu uzata en la senco de **propagandi** (*propagovat, ŝirit, veĉejně uvádět ve známost*).
2. **Aŭskulti** (*poslouchat, naslouchat, (právnícky) vyslechnout*) ne konvenas por esprimi „respekti ordonon“ (*být poslušný, řídit se příkazem*). Por tiu signifo konvenas: **obei**.
3. **Absolvi** estas precipe religia termino kaj signifas „*rozhrěšit*“ – laŭ Nova PIV: pardoni kaj nuligi pekojn (pekliberigi); deklari iun senkulpa (malkondamni). Absolvi estas por ĉeĥoj falsa internacia amiko. La ĉeĥlingva „*absolvovat*“ estas: (lernejon) fini, **finstudi**, trafrekventi, finfrekventi, netransitive estas uzebila ankaŭ abiturientiĝi, (kurson) **plenumi**, (ekzamenon) **sukcese trapasi**.
4. „**Ĝojas min**“ estas eraro, la verbo ĝoji ja estas netransitiva kaj esprimas, ke subjekto mem (mi, vi, li...) ĝojas. Se vi deziras diri, ke io aŭ iu kaŭzas al vi ĝojon, vi devas diri, ke tio aŭ tiu (vi, li, ŝi...) **ĝojigas min**.

2005-05-06

Distingu la prepoziciojn dum kaj en

Mi legis: *Mi dormis dum du tagoj ĉe s-ino...* Ĉu la informo estas prava?

La prepozicio „dum“ montras la tempon, en kies daŭro io okazas (nova PIV). Ekzemploj el la vortaro: *fleksu arbon dum ĝia juneco* (Zamenhof); *dum la parolado li dormis*. – Mi dubas, ke aŭtoro de la supra frazo ĉe la sinjorino dormis la tutajn du tagojn (2 x 24 horojn). Uzo de la prepozicio „dum“ en la supra frazo estas malĝusta. Bone uzebla tie estas la prepozicio „en“.

La prepozicio „en“ havas ok signifojn, el kiu konvenas la 3-a: prepozicio montranta la tempodaŭron, interne de kiu okazas la ago. Ekzemploj: *en la venonta jaro mi vizitos Germanujon* (Zamenhof); *dek horojn en la tago ŝi kudradis*.

Antaŭ nelonge mi kritikis uzon de „dum“ plurfoje, ankaŭ en artikolo por „Fervojfakaj kajeroj“ (IFEF), kie aŭtoro skribis: *La inundo dum la jaro 2002...* La inundo en Bohemio ja ne daŭris la tutan jaron 2002! Nepre tie devas esti „*en la jaro 2002*“.

Ne uzu „dum“, se ago aŭ stato ne daŭras dum la tuta indikita tempounuo.

Brno 2005-04-17

Netransitivan verbon ne rajtas sekvi rekta objekto

Mi legis: „*Nova damaĝanto danĝeras Eŭropon.*“ Ĉu bone?

„Danĝer“ estas substantiva radiko (danĝero). Se oni verbigas ĝin, oni ricevas verbon danĝeri, kiu estas netransitiva, kiu ne rajtas havi apud si rektan objekton „Eŭropon“.

Zamenhofa proverbo: „*Por virta orelo ne danĝeras vorto malbela*“. Ni klare komprenas, ke por virta orelo vorto malbela ne estas danĝera, daŭre danĝera. El tio ni deduktas, ke danĝeri = esti danĝera. Nepre ĝi ne signifas, ke io venas el la stato sendanĝera al la stato danĝera.

Se ni bezonas esprimi ŝanĝon de la ĝisnuna sendanĝera stato al la stato de danĝero, ekzemple pro apero de nova damaĝanto, ni nepre devas fiksi al la substantiva radiko „danĝer“ la sufiksoidon –ig: danĝerigi. Ni tiel ŝanĝas ne nur la staton de subjekto, sed ankaŭ netransitivan verbon al verbo transitiva. La supra frazo devas teksti: „*Nova damaĝanto danĝerigas Eŭropon*“. Se ni deziras pli precize esprimi la sencon „*meti en danĝeron*“, ni modifu la frazon al la formo: „*Nova damaĝanto endanĝerigas Eŭropon.*“

Aliaj ekzemploj:

§ „Kap“ estas substantiva radiko. La netransitiva verbo „senkapi“ esprimas la staton de senkapeco: *Mi senkapas* = Mi estas sen kapo. Transitiva verbo estas „senkapigi“. *Senkapigi mortkondamniton* = Senigi mortkondamniton je la kapo.

§ „Plezur“ estas substantiva radiko. La netransitiva verbo „plezuri“ esprimas „senti plezuron“. Ekzemplo: *Infanoj plezuras ĉe pilkludado*. La transitiva verbo „plezurigi“ signifas havigi al iu plezuron, ekzemple en la frazo: *Li plezurigis sin per vino*.

2004-08-11

Duoblajn konsonantojn ni ne kontraŭstaru

Plurfoje mi aŭdis aserton, ke duoblaj konsonantoj (*zdvojené souhlásky*) estas en Esperanto malpermesitaj, sed neniam mi aŭdis, laŭ kiu aŭtoritato.

Vortoj kun duoblaj konsonantoj sporade ekzistas en esperanta literaturo kaj ne estas konvene taksati ilin eraroj (brutte, bullo, finno, gallo, nette, vendetto k.a.). Du tiaj vortoj estas en la Fundamento: la virina nomo Anno kaj la nomo de germana verkisto Friedrich Schiller, sub la esperanta formo Ŝillero. Krom tiuj du kazoj Zamenhof en la verkaro uzis duoblajn konsonantojn plurfoje. Tio plene sufiĉas kiel argumento, ke duoblajn konsonantojn neniu rajtas malpermesadi.

La Zamenhofs Ŝillero kontrastas kun la reviziita PIV, kie la nomo de skota fizikisto kaj inventinto James Watt estas asimilita al Vato, sinonime al Ŭato (teruraĵo). Tion mi konsideras kiel ofendon de la fama viro. Por la unito de povumo PIV prezentas *vatto*, sed kun referenco al *vato*.

Estas strange, ke homonimofobio reganta en la movado ne instigis Michel Duc Goninaz diferencigi la fadenajn *vato* disde la unito *vato* kaj la fizikisto *Vato*. Kompare kun la fobio kontraŭ duoblaj konsonantoj estas stranga la plena kontenteco de esperantistoj kun duoblaj vokaloj, ekzemple: Isaako, koordinato, maato, metroo, reela, zoologo k.a.

Mi rekomendas akceptadi duoblajn konsonantojn kaj vokalojn kiel normalan lingvan fenomenon. Ni nomu s-ron James Watt prefere laŭ lia origina skribformo, se iu tamen deziras ĝin asimili, apliku do la formon *Vatto*. Ankaŭ la unito estu nepre *vatto*, cetere tia formo estas en nia ĉeĥa-esperanta vortaro de K. Kraft.

2008-03-07.

ENHAVO

1. Pri la verbo danki
2. Slavoj, atentu la uzadon de la refleksivo „si“!
3. Ĉu kunmeti adjektivan radikon ĉefelementa substantivo?
4. Medialo voĉo ne toleras pasivajn finaĵojn
5. Serio – serialo
6. Atentu la prepoziciojn „de“ kaj „da“
7. Kiel diferencas prezenti kaj reprezenti
8. Amaskomunikiloj, mediato
9. Kompleksaj tempoj en Esperanto estas iluzio
10. Erara uzo de la adverbo „ĵus“
11. Misuzo de la pronomoj „kia“ kaj „kiu“
12. Adverboj „foje“ kaj „iam“ diferencas
13. Erara uzo de la propozicio „po“
14. Distingu la propoziciojn „pro“ kaj „por“
15. Ĉu „nebullo vaporiĝas“?
16. Pri la verbo „interesi“
17. Propagi – aŭskulti – absolvi – ĝoji
18. Distingu la propoziciojn „dum“ kaj „en“
19. Netranzitivecan verbon ne rajtas sekvi rekta objekto
20. Duoblajn konsonantojn ni ne kontraŭstaru